# NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es

**JUNIO 2010**


## AMASMEDIOJ

La publika tutnacia televido TV-1 elsendis raporton pri Esperanto la dimanĉon 13an je la 15:30 kaj ripetita, ne tute sama, je la 21:30. Ankaŭ ĝi aperis en kanalo "24 horas". La raporto daŭras tri minutojn, enhavas kelkajn malverojn sed ĝenerale pozitivas al nia afero. Kiel konate, la plej grava sciaĵo por ĵurnalistoj estas: kiom da homoj parolas Esp-on; kaj ili nepre bezonas nombron. Ili ankaŭ tro insistas pri nia konfronto al la angla lingvo. En la raporto aperas unue malnovaj arĥivaĵoj, poste samideanoj el urbeto Cheste, sekva ero registrita en Pekino kaj laste, dum preskaŭ unu minuto, grupo da madridanoj.
La registrado en Madrido okazis la tagon 3an en drinkeja teraso, laŭ iniciato de la ĵurnalistoj. Por la okazo kunvenis ĉ. dekduo, kunvokitaj iom haste per la forumo. Dum duona horo oni filmis nin, rekte pridemantante unu post alia. Saĝe kaj interese parolis pluraj, ekzemple Miguel Fernández, sed ili selektis la erojn plej anekdotajn, kiuj redonas ian bildon de afero kaj uloj ekstravagancaj. Estas klare, ke la ĵurnalistoj (eble ankaŭ la TV-spektantoj) interesiĝas pri personaj cirkonstancoj, kaj ne tiom pri facila neŭtrala lingvo.
Tamen, entute tiu ĉi televida apero estis tre bona okazaĵo, apenaŭ imagebla se ni mem volus estigi ĝin. Espereble ĝi kaŭzos nombraltiĝon de vizitoj al esperantaj retpaĝoj.
Ambaŭ elsendoj estas spekteblaj ĉe "e-mule" dank'al M. Gutiérrez, sub la respektivaj nomoj:
TVE-1 (10-06-13-15-00) (pri Esperanto hispane)
TVE-1 (10-06-13-20-00) (pri Esperanto hispane)

## OMAĜO AL LA POETO MIGUEL HERNÁNDEZ

Kiel planite, la sabaton 12an vespere kunvenis ĉ. kvardek homoj (el kiuj la duono estis geamikoj ne-esperantistoj) ĉe monumento dediĉita al nun jubileata poeto Miguel Hernández. La pluvema vetero ĵus permesis nin ĝui serion da poemoj, kaj en sia originalo kaj en esperanto, en la voĉoj de Ana Manero kaj Miguel Fernández Martín, la tradukinto. Tiel ke ni akiris oficialan permeson, la urba polico zorgis pri la bonaj kondiĉoj kaj ne-ĝenado dum la akto. Sekvis agrabla drinkumado en proksima drinkejo.

## KURSOJ

Finiĝis la kurso gvidita ekde oktobro 2009 fare de Pedro Hernández en la sidejo de HEF. Ni informos pri novaj kursoj en tiu sidejo.

## EN HISPANIO

Barcelona E-Centro partoprenis la foiron Firentitats la 5an de junio per stando numero 85, dum la tuta tago ekde la 9ª horo. Tie la vizitantoj trovis diversajn informojn pri la lingvo kaj movado, kaj pri la onta Internacia Esperanto-Semajno, oktobre okazonta en El Vendrell.

Kadre de la maratono de rakontoj de Guadalajara okazanta en la Palacio del Infantado, la dimanĉon 13an Raúl Martínez partoprenis per mallonga rakonto en Esperanto.

## TRA LA MONDO

**Riĉa programo dum kvar somersemajnoj en la Esperanto-kastelo.**
25 volontuloj el pluraj landoj zorgos pri vere interesa programo kaj agrabla restado inter la 17ª de julio kaj la 14ª de aŭgusto 2010 en kastelo Greziljono, kiu situas ne for de Parizo.

Legu pli pri tiu programo,

http://www.gresillon.org/spip.php?rubrique8

Alighilo kun pliaj informoj legu kaj printu tie:

http://bertox.free.fr/g/Gresillon2010.pdf

au petu al bertox {@} free.fr

### Informado en Esperanto pri aktualaĵoj en la Eŭropa Unio

En la unua duono de la jaro 2011 Hungario plenumos prezidadan taskon de la Eŭropa Unio. En 2010 tiajn taskojn plenumas Hispanio kaj Belgio. Ĉi tiuj tri landoj formas triopon por komune kunordigi la ĉefajn celojn kaj taskojn por unu kaj duona jaroj. En Hungario kelkaj iniciatemaj kaj influhavaj civilaj organizoj kunlaboras por influante helpi registaran prepariĝon al la prezidado. Tiu ĉi malfermita civila laborkomitato en 2008 proponis al la Ministerio pri Eksteraj Aferoj iaspecan kunlaboron, en kies kadro civilaj organizaĵoj unuflanke informiĝas pri la ĉefaj politikaj farendaĵoj, aliflanke ili prezentas ideojn, emfazas civilajn interesojn al la politiko.

Ankoraŭ en decembro 2008, okaze de konferenco, kiun komune organizis la menciita ministerio kaj la civila laborkomitato, la Hungaria Esperanto-Asocio faris proponon je la kunlabora partopreno per informado en Esperanto. La organizantoj akceptis la proponon. En 2009 okazis pluraj laŭtemaj civilaj kunvenoj, kiujn ĝenerale partoprenis ankaŭ esperantistoj, same kiel konferencon en januaro 2010. La esperantlingva informado komenciĝis helpe de retpaĝo www.vilagnyelv.tripod.com . Konsidere la enhavon en ĝi temas pri esencaj informoj pri oficialaj dokumentoj, pri laŭtemaj kunvenoj de civilaj organizaĵoj, pri novaĵetoj. Indas apartan mencion la konigo pri la formiĝo de la Danubo-regiona Strategio, kies celo estas certigi pli grandan prosperon, sekurecon kaj pacon al la civitanoj en la areo de tiu makroregiono.

Ĉi tiu strategio verŝajne povos alpreni kaj apogi esperantistajn iniciatojn kaj kunlaborojn. Similan, ekzemple, kia estis antaŭ jardeko dum kelkaj jaroj la Danuba Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo (DESKF), sed tiam ne havanta eblon por oficiala apogo.
*László Gados (el Eŭropa Bulteno n-ro 94***)**

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj **konversaciaj rondoj** okazas ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079.

**********************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID